

# TEA-BULTENO

16<sup>A</sup> JARO

NOVEMBRO - DECEMBRO 2013

NUMEROJ 11-12

La plej mirinda eco de milito estas, ke ĉiu murdistestro benignas siajn flagojn kaj solene preĝpetas Dion, antaŭ ol sin dediĉi al ekstermado de siaj proksimuloj.  
*François Marie Arouet (Voltaire) (1694-1778)*

## Karaj Gelegantoj!

Somero jam delonge for: ne plu tiom varmigas la suno, ofte griza nebulo vualigas la bele brilajn flav-ruĝajn kolorojn de la kreskaĵoj ĉi-sezonaj; jam en forgesujo la momentoj pasigitaj sur la triestaj strandoj, kiam - kiel la-certoj - ni "rostiĝis", celante akumuli kiel eble plej da sunradiado por alfronti la malvarmajn monatojn, rapide alproksimiĝantajn.

Feliĉe ĝis nun la temperaturo estis tre milda, malgraŭ ke la aero atingis nivelojn de malsekeco tute eksterordinarajn: 98-procentojn da!!! Sed tio ne malhelpis realigi niajn planojn, en la last-oktobraj tagoj. Ne tiel gapu al mi, ne montru tian surprizoplenan mienon! Ĉu vi ne plu memoras, ke via asocio estis engaĝita en tre seriozaj eventoj? Ne ununura evento, eĉ du! Mirinde kaj mirakle, ĉu ne?

Do, por kontentigi vian scivolemon, tre ĝentile mi rakontos, kio estis okazinta ekde la 25.a ĝis la 30.a de oktobro.

Enkadre de Grundtvig-partnera Projekto, titolita "Elloke tutmonden: la novaj defioj de volontulado", kaj financita de Eŭropa Unio, okazis la unua dutaga (26-27.10) renkontiĝo, dum kiu ĉeestis ĉiuj partneroj: Bjalistoka E-Societo; E-Asocio de Skotlando;

E-Grupo Verĉelli; Eurokka - Vinilkosmo; la tripersona muzikgrupo Asorti kaj Triesta Esperanto-Asocio. La projekto daŭros ĉirkaŭ du jarojn, pli precize ĝis la 31.a de julio 2015, kaj per ĝi oni antaŭvidas moviĝadon fizikan de 12 personoj el la supre indikitaj partneroj kaj interŝanĝadon de scioj kaj informoj pri ses ĉefaj temoj, po unu renkontiĝe:

- ★ Organizado de kulturaj lokaj eventoj;
- ★ Memmastrumado (alfrontado de diversaj situacioj analizante la kaŭzojn de streĉiteco kaj aliaj negativaj situacioj);
- ★ Financa mastrumado kaj monakirado;
- ★ Kunlaborado kun lokaj instancoj kaj edukaj institucioj;
- ★ Mastrumado de volontuloj, interkulturaj teamoj;
- ★ Sociaj retoj, retaj iloj por organizoj.

Ĉi lastan temon oni ĝuste pritraktis en Triesto, tute trafe je la komenco de la planitaj kunvenoj, precipe tial ke en tiu dujara periodo la kunlaboragado estos ĉefe perreta. En la TEA-sidejo, la ĉeestantoj, ĉiuj samtempe rete ligitaj, atente aŭskultis la gvidanton de la seminario, Francesco Maurelli, kiu praktike, helpe ankaŭ de surekrana projekciado, klarigis la uzmetodojn kaj la eblojn liveritajn de la diversaj retaj

iloj al tiuj, kies nura ebleco senpere interrilati, por partnere kunaktivadi, estas la posedo de lerta mastrumado de programoj, kiaj Dropbox, Guglo-Kalendaro, Dudlo, Vizaĝlibro kaj aliaj.

Post la dutaga seminario, okazis la Aŭtunaj Karstaj Tagoj (28-30 okt.), dum kiuj ni akompanis niajn gastojn tra la karsta altebenaĵo, de Napoleona Pado al Monto Grisa, pluen al Prosecco por poste malsupreniri ĝis la maro por vizito de la parko kaj kastelo Miramar. Sekvatage de Prosecco al Santa Croce tra Pado Naturo kaj fine, al Valo Rosandra. La vetero ne estis tro favora dum la unuaj du tagoj, sed poste feliĉe prezentiĝis nia Bora kiu forpuŝis nubojn kaj nebulon, (eĉ nin ĝi skuetadis senkompate!), la suno brilegis, danke al kio la valo Rozandro aperis antaŭ niaj okuloj en sia plej alloga vesto.

Tiu ĉi estis nia aktivado oktobra: estas tamen antaŭviditaj pluraj aliaj interesaj programoj novembro kaj decembre, kiujn vi nepre ne maltrafu, precipe ne forgesu pri la rendevuo je la 14.a de decembro dediĉita al nia Majstro.

Konklude, ni atendas vin multnombraj por aldiri kelkajn kuraĝigajn al la TEA-laborantoj kaj -decembrofine - por la kutima interŝanĝo de kristnaskaj kaj jarfinaj bondeziroj! Ĝis baldaŭ!

Via Elda

## Tra la mondo...

**En Parizo**, estis malfermita la unua trinkejo por 'Katoj'! Tre originalan ejon oni starigis en la franca ĉefurbo, kie teon aŭ aliajn trinkaĵojn oni povas gustumi kune kun deko da katoj kiuj vivas tie, inter la tabloj, kaj eĉ povas esti adoptitaj. 'Le café des chats' troviĝas en la Marais-kvartalo. La ideon ekhavis juna entreprenistino kat-amanta: ŝi celas kontentigi klientojn-homojn kiuj ŝatus havi hejme



katojn sed male ne posedas ilin, kaj, samtempe, la klientojn-katojn, kiuj ricevas bongustaĵojn, estas daŭre kontrolita ilia sanstato kaj laste, sed fine la plej grava, ili ĝissate ricevas ĉiajn plej amespriamajn dorlotaĵojn de la klientoj-homoj!

**Grave, grave** por esperantistoj! Danke al Antonio De Salvo, kiu kunmetis kaj pretigis la tutan tekston, kaj al Fabio Bettani, kiu enretigis ĝin, eblas legi 'Eneado'-n de Vergilio en ESPERANTO je la paĝo:

<http://www.esperanto.it/libri/traduzioni-letterarie/classici-greci-e-latini.php>

## Laste trovitaj!

Esperable baldaŭ mia kolekto el 33 poŝtkartoj pri la esperantistaj pioniroj, eldonitaj de s-ino Alice Farges iom antaŭ la 10.a Pariza UK (kiu devintus okazi en aŭgusto 1914.a) iĝos kompleta, kvankam pri tio mi forte dubas, ĉar estas absolute netroveblaj du el ili. Tamen mi kontentiĝas (tio eliĝas malfacile tra miaj 'kunpremitaj' dentoj), sed ne perdis la esperon ĉar daŭre tiujn mi serĉas je ĉia okazo.

Tiuj kartoj enhavas apartan ĉarmon, unue pro la humor-satir-karikatura prezento, kio signifas ke ankaŭ esperantistoj kapablas ridi kaj ridigi pri si mem, due pro tiu evidenta atesto, ke en tiuj foraj jaroj, per tiutempaj rimedoj, malkaŝe kaj senhonte, universitataj profesoroj, arkitektoj, lernejestroj, okulistoj ktp propagandadis iun nenacian lingvon, strangan kreitaĵon de iu Zamenhof, malantaŭ kiu kaŝiĝis la vera celo, nome interfratiĝo kaj porĉiama paciĝo de ĉiuj popoloj danke al senpera interkomprenilo. Do, tio faris, ke ankaŭ tiu bravuloj estis titolitaj 'stranguloj, utopiistoj, revantoj pri maleblaj aĵoj', kiel ofte okazas ankoraŭ nun. Sed nek insultoj nek mokoj haltigis (ĉu haltigos?) la "laboron pacan de la diligenta kolegaro" kaj tiel estos "ĝis la bela sonĝo de l'homaro/por eterna ben' efektiviĝos".

Ni daŭrigu konatiĝi kun kelkaj el tiuj centoj kaj centoj da laboremaj kolegoj, kiuj pligliatigis al ni la vojon irantan kaj irontan - pli-aŭ-malpli rapide - al la trafpunkto.

**Kiu estis Gabriel CHAVET?** Li naskiĝis en Digoin, sur la rivero Loire, apud Macon (nord-orienta Francio) la 14.an de decembro kaj mortis en Parizo la 23.an de oktobro 1972. Gabriel Chavet estis licenciato pri leĝoscienco. Li estis pacifisto kaj tial kunlaboris aktive kun diversaj societoj kaj revuoj. En 1922 li iĝis sekretario kaj kasisto de unu el la plej malnovaj pacifistaj asocioj, la 'Ligue Int. De la Paix et de la Liberté', krome zorgante la publikigon de ties bulteno.


Estante gimnaziano, en 1896 li memlernis Esperanton kaj jam la postan jaron kun samlernejanoj li fondis en Louhans, urbeton apud Macon, la unuan esperantistan klubon en tuta Francio. En 1900 fondiĝis la Grupo E-ista de Parizo, kies sekretario kaj kasisto li fariĝis. En 1905 oni elektis lin sekretario de la Esperantista Centra Oficejo kaj tre aktive li engaĝiĝis en la organizaj preparlaboroj de la UK-j ekde 1906 ĝis 1914. Li estis la ĝenerala sekretario de ĉiuj tiuj kongresoj kaj redaktanto de la oficialaj raportoj.

Li ankaŭ prenis sur sin la sekretarian laboron de la Lingva Komitato, redaktis la Oficialan Gazeton E-istan kaj okupiĝis pri la publikigo de ĉiuj gravaj laboroj eldonitaj de la Centra Oficejo pri statistiko, bibliografio k.a. Gabriel Chavet kunlaboris kun Privat pri la kon-



trakto de Helsinki de 1922 ĝis 1932. Li estis prezidanto aŭ sekretario de grupoj aŭ asocioj, faris multajn propagandajn paroladojn kaj kursojn, fondis kun Warnier la "Librairie de l' E" en 1906.

Dum la milito li instigis la Subministron de la milita sanitara servado, Justin Godard, (n.d.r.: advokato, politikisto, li estis urbestro de Liono; i.a. en 1918 fondis la Ligon kontraŭ kancero; ege agadis en la sanitara kaj sociala kampoj. Malnova amiko de Esperanto kaj honora membro de UEA.) ke li sendu oficialan cirkuleron por rekomendi al ĉiuj militkuraĉejoj disdoni al la soldatoj gvidlibrojn de la Ruĝa Kruco en diversaj lingvoj kun traduko en la Internacia Lingvo de frazoj necesaj al la militvunditoj. Li partoprenis en la fondo de la asocio de pacifistaj



Esperantistoj kaj kunlaboris kun redaktantoj de la revuo 'Espero pacifista' (1905-06); fondis la unuan Asocion de E-Poŝtistoj (1911); eklaboris en la Rotaria Esperanto-Amikaro ekde ties fondiĝo (1928).

Li verkis por diversaj Esperantaj ĵurnaloj artikolojn pri la itala, flandra kaj hispana artoj kaj por la 'Revuo' tre gravan verkon pri la pentristo El Greco, premiitan en la Floraj Ludoj. Krome li verkis lernolibron kaj franca-esperantan vortaron; li estis ankaŭ unu el la ĉeflaborantoj de la Enciklopedio de Esperanto (eldonita en 1933).

Li energie entreprenis plurajn aktivadojn en la plej diversaj kampoj. Lia imitinda laborado en la Esperantista Centra Oficejo (ECO) de Parizo donis al ĉi tiu konsiderindan elanon por sukcese realigi la unuajn planojn pri ĝia plena funkciado, danke ankaŭ al apogo, monsubtenado kaj kunlaboro de valoraj pioniroj, kiaj - inter aliaj - generalo Hippolyte Sebert kaj d-ro Émile Javal. Iom post iom ECO fariĝis La centra organizaĵo, al kiu aldirektiĝis ĉiuj periferiaj movadaj institucioj.

Nun, koncizete, eta historio pri ECO. Intense dezirata de generalo Sebert, ĝi plenumadis siajn servojn de 1905 ĝis 1922. Post la UK en Boulogne-sur-Mer, el pluraj flankoj ekvenis demando pri ĝenerala movada organiziĝo kun la celo klopodi unuigi ĉiujn fortojn por sukcesa antaŭenigado de la Afero. Jam ekde la unua momento tute evidentiĝis ke ne tiel facile kaj rapide tio realigeblos, tial estis decidite, unue solvi la plej urĝajn bezonataĵojn: la Lingvan kaj Organizan Komitatojn, prezidatajn respektive de Émile Boirac [vidu Tea-Bultenon, majo-junio 2011; n.d.r.] kaj generalo Hippolyte Sebert. La rolo de la Centra Oficejo iĝis iom post iom ĉiam pli grava: ECO ekdediĉis sin al plej diversaj agadkampoj: a) organizado de la laboroj de la Lingva Komitato, poste Akademio; b) starigo kaj zorgado de arkivejo



por ĉiuj korespondaĵoj alsenditaj kaj elsenditaj; c) preparado de laborkunsidoj kaj publikigo de oficialaj raportoj; ĉ) verkado kaj eldonado de la Oficiala Gazeto (la ege grava organo de ECO, en kiu aperis lingvaj demandoj, proponoj kaj diskutoj, informoj pri gazetoj, literaturo, adresaro de asocioj, kaj multo alia); d) organizado de UK-j; e) starigo, katalogado kaj konservado de biblioteko; f) informkaj propagand-kampanjoj al ŝtataj registaroj, administracioj ŝtataj kaj privataj...

Post tiuj multaj gloroplenaj jaroj kaj ampleksega agado, sekve de la morto de Javal, la malavara ĉefa mecenato, la financa situacio pli kaj pli malboniĝadis ĝis fine kolapsi, malgraŭ ĉiaj streboj de generalo Sebert alfronti la problemaron por trovi rimedojn kaj replenigi la kason: la Centra Oficejo estis definitive fermata en 1922.

La biblioteko kaj arkivo estis donitaj al la Pariza Komerca Ĉambro, en 1929. Pli poste parto de la libroj revenis al la historia biblioteko de Unuiĝo Franca por Esperanto (Parizo), kie ankoraŭ nun troviĝas.

*Se vi sentas ian scivolemon ekscii ion plian, bonvolu viziti la U.F.E.-ttt-ejon: tie vi malkovros interesajn juvelojn el nia historio, ekzemple, kiel tiun ĉi flankan, koncernantan la viziton de d-ro Zamenhof en la Esperantista Centra Oficejo, la 15-an de aŭgusto 1913:*

El artikolo de S-ino E. Ferter-Cense en la bulteno "France-Espéranto" - Majo-Junio 1917, anoncinta la morton de Doktoro Zamenhof, en kiu aperas ankaŭ ĉi foto.

«Lastan fojon, kiam D-ro Zamenhof venis Paris'on, por ĉeesti la enterigon de S-ro Carlo Bourlet, la 15-an de Aŭgusto 1913, li vizitis la Esperantistan Centran Oficejon kaj enskribis sian nomon sur la Oran Libron.»

Ĉiu el ili skribis en tiun libron - kelkajn vortojn:

jen tiuj de Gabriel Chavet: «Mi deziras, ke multegaj Esperantistoj vizitu la Oficejon. Kaj subskribu tiun libron.»

*Mi sentas ĉiam fortan emocion, kiam prezentiĝas okazo trovi nekonatajn informojn pri vivmomentoj kaj de nia Majstro kaj de tiuj kiuj tre fervore sekvis Liajn idearon kaj idealon kaj strebis por progresigi Esperanton kaj la movadon tra la mondo. Krome, la diskonigado de tiuj informoj reprezentas por mi ian formon kontribui al malforgeso de parto de nia historio.*

E.D.

Fontoj: EdE; Vikipedio; ttt-ejo de U.F.E. (<http://arkivo.esperanto-france.org/>); Oficiala Gazeto (Vol. 1.a)



## Triesta Esperanto-Asocio lanĉas dulingvan Konkurson pri Pentrado, kun titolo: Premio "Angelo Soranzo" - Jaro 2014

### Regularo

**Art. 1** Senpaga estas la partopreno. Je libera temo, la konkurso akceptas kiun ajn teknikon, inkluzive de "glulaboraĵoj" kaj "mozaiko". Ĉiu verko devas enteni tekston, de almenaŭ unu vorto, dulingvan: en esperanto (skribita en verda koloro) kaj en unu el la lingvoj de Eŭropa Unio (skribita en alia ajna koloro). Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per pentraĵo kun maksimumaj dimensioj: 80x80 cm, inkluzive de kadro.

**Art. 2** Sur la verka malantaŭo devas esti la aŭtoraj donitaĵoj kaj la titolo, en kiu ajn lingvo. Krome, ĝi estu provizita per taŭgaj iloj por simpla alkroĉado surmura.

**Art. 3** Art-Komisiono, alcele elektita, distribuos la jenajn premiojn:

1-a premio - € 450

2-a premio - € 250

3-a premio - € 150

★ Speciala premio por la plej signifa teksto: € 150 Ĉiu partoprenanto ricevos de Triesta Esperanto-Asocio partopren-diplomon.

**Art. 4** TEA retenos la premiitajn verkojn kaj havos pri ili plenan reproduktorajton.

**Art. 5** Enskribiĝo kaj transdono de la pentraĵoj okazos, en 2014, ĉe sidejo de TEA (via del Coroneo 15, 34133 Trieste) en koncernaj vendredaj tagoj de la marta, maja, junia kaj septembra monatoj, ekde la 19.a horo ĝis la 20.a k 30.

**Art. 6** La ekspozicio de la konkursontaj verkoj okazos ĉe TEA-sidejo, aŭ en aliaj ejoj ankoraŭ difinendaj, en **novembro 2014**.

**Art. 7** La premio-disdonado okazos vendredon la **5-an de decembro 2014**, ĉe la TEA-sidejo.

**Art. 8** La nepremiitaj verkoj estos je dispono de la aŭtoroj en la **vendredoj de januaro 2015**, de la 19.a horo ĝis la 20.a k 30. Se ĝis la 24.a de januaro 2015 oni ne reprenis sian pentraĵon, tiu iĝos posedaĵo de TEA, kun ties reproduktorajto.

**Art. 9** La juĝo de la elekta komisiono estas neapelaciebla kaj nekontestebla.

La Organiza Komitato, kvankam garantiante ordinaran gardadon de la transdonitaj verkoj, tamen ne respondecas pri ŝteloj kaj/aŭ domaĝoj eventuale okazantaj.

La partopreno en la konkurso antaŭvidas la senrezervajn konon kaj akcepton de la regularo, plus la plenigadon de la enskribiĝilo.

**Art. 10** Konforme al la leĝo n. 196/03 pri gardado de personaj donitaĵoj, oni certigas, ke ĉiujn ricevitaĵojn oni prikonsideros per la pleja diskreteco kaj, en ĉiu momento, la aŭtoro rajtos peti ilian ĝisdatigon, kontrolon aŭ forviŝon.

**Art. 11** La Asocio tenas por si la rajton, akcepti aŭ malakcepti la partoprenon de la prezentotaj konkursajtoj.

Por ĉiu ajn informo kaj por ricevi la konkursajn regularon kaj partoprenilon, kontaktu la organizanton. Bonvolu disvastigi ĉi konkurson!

Triesta Esperanto-Asocio

Tel: 331 - 4805706

[esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it);

[nored@tiscali.it](mailto:nored@tiscali.it); [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)

<http://tea1906.altervista.org>

## PLIOFTAJ PARONIMOJ

Jen la **lasta listo** (por tiu ĉi jaro) sendita de nia amiko VIGLO!

Ĉu li disponas pri ia neelĉerpebla puto?

<b>Plando</b>	(An) suba plata piedparto	<b>Poreo</b>	(Bo) kultivformo de aliumo ( <i>Allium porrum</i> )
<b>Planto</b>	(Bo) radikohava, plantebla vegetaĵo	<b>Poro</b>	(An) (Bo) (Zo) preskaŭ nevidebla trueto en haŭto aŭ ekstera surfaco
<b>Plastiko</b>	reliefa reprodukto de formoj	<b>Poŝto</b>	publika organizo porletertransporto
<b>Plasto</b>	(Te) polimera substanco kun modlaj ecoj	<b>Poŝtaĵo</b>	ĉio, kio estas sendita per poŝto
<b>Plastio</b>	(Md) operacio cele al riparo aŭ modifo de homorgano	<b>Postaĵo</b>	parto kontraŭa al la fronto
<b>Plastro</b>	ekstera tolmedikamento	<b>Poto</b>	vazo ordinare destinita por kuirado
<b>Platano</b>	(Bo) G. ( <i>Platanus</i> ) de monoikaj falfoliaj arboj	<b>Puto</b>	(Te) profunda truo farita en tero por ĉerpi akvon, petrolon
<b>Plateno</b>	(Ke) elemento Pt, metala, altvalora	<b>Prajmo</b>	ujeto entenanta eksplodeman substancan
<b>Platino</b>	(Te) la supra metala tabulo en presmaŝino	<b>Pramo</b>	(Mr) granda ŝipo por transporto
<b>Pledi</b>	paroli antaŭ jugisto, defendocele	<b>Premi</b>	apliki forton; ĝeni, suferigi; maljuste trakti
<b>Plendi</b>	per vortoj esprimi doloron, malplezuron	<b>Premii</b>	rekompenci per premio
<b>Plombo</b>	(Md) metalcemento por kurace ŝtopi dentkavaĵon	<b>Prepozicio</b>	morfemo; neŝanĝebla vorto
<b>Plumbo</b>	(Ke) elemento Pb, tre peza metalo	<b>Propozicio</b>	vortgrupo esprimanta kompletan opinion
<b>Pluvo</b>	(Me) akvo, gute teren defalanta	<b>Preskribi</b>	formale k aŭtoritate ordoni
<b>Pluvio</b>	(Zo) Sp. de vadbirdo (G. <i>Charadrius; Pluvialis</i> )	<b>Priskribi</b>	detale prezenti ion per vortoj
<b>Polico</b>	administracio komisiita garantii publikan ordon	<b>Proskribi</b>	senjuĝe ekzili, en milita tempo
<b>Poliso</b>	asekurdokumento	<b>Produkto</b>	rezulto de produktado
<b>Polmo</b>	(An) interna faco de la mano	<b>Produto</b>	(Mt) rezulto de multipliko
<b>Pulmo</b>	(An) spiradorgano ĉe la homo k aerspirantaj bestoj	<b>Progreso</b>	antaŭeniĝo, priperfektigo
<b>Polpo</b>	(Zo) Sp. de okbraka cefalopodo	<b>Progresio</b>	(Mt) vico de kvantoj devenantaj unu el alia kun ia reguleco
<b>Pulpo</b>	(Bo) la mola parto de fruktoj, radikoj	<b>Propilo</b>	(Ke) radikalo C <sub>3</sub> H <sub>7</sub>
<b>Polvo</b>	eretaro de libera substanco	<b>Propileo</b>	(Ar) monumenta pordego ĉe enirejo de templo
<b>Pulvo</b>	(Te) eksplodema substanco	<b>Provo</b>	ago, rezulto de iu, kiu provas
<b>Polvero</b>	unu ero de polvo	<b>Pruvo</b>	argumento aŭ fakto montranta la verecon de io
<b>Pulvoro</b>	(Te) solida aŭ likva substanco diserigita	<b>Pruo</b>	(Mr) la plej antaŭa parto de ŝipo aŭ boato
<b>Pudro</b>	tualeta pulvoro	<b>Prujno</b>	(Me) blanka frosto; roso
<b>Ponto</b>	(Ar) konstruaĵo ebliganta transiradon super rivero ks.	<b>Pruo</b>	(Bo) frukto de prunarbo ( <i>Prunus domestica</i> )
<b>Pontono</b>	(Mr) platfunda ŝipo; flosponto	<b>Prunelo</b>	(Bo) frukto de prunelarbo ( <i>Prunus spinosa</i> )
<b>Spontono</b>	mallonga lanco		
<b>Poplo</b>	(Bo) G. ( <i>Populus</i> ) el salikacoj, alta arbo		
<b>Popolo</b>	samlanda loĝantaro		

### NIA VIVO

Bildstrioj de Singer (Usono) – Komentoj de Viglo.

(daŭrigo el la antaŭa Bulteno)



### ADOLESKO

Depost la unuaj seniluziigoj, li pretas konkeri la mondon!!!

(daŭrigo venont-Bultene)



### **Senkolesterola (preskaŭ!) kuko...**

Estas alproksimiĝantaj la festotagoj, pli plezurigas nin en ontaj malvarmaj monatoj forne kuiri, tiel ke bonodoro kaj varmeto kontentigas ĉies gustojn (i.a. tio estas bona preteksto por ŝpari gasan aŭ elektran hejtadon, ĝuste en ĉi kriza ekonomia periodo!), frosto bezonigas al niaj korpo kaj cerbo multe pli da sukero ol somere: kompetenta dommastrino kunmetas ĉion ĉi, ilin kunmiksas kaj kirlas, por fine liveri feliĉigajn bongustaĵojn. Jen du, tre facile pretigeblaj delikataĵoj, tute ne elspezigaj, kiuj emigos viajn gekarulojn surŝuti vin per multe da laŭdoj kaj komplimentoj. Jen la unua:

#### **Ĉokolada kuko senova**

##### Ingrediencoj:

200 g da faruno  
250 g da sukero  
100 g da kakao-pulvoro  
1/4-litra da lakto  
1 dozo da gistopulvoro  
1 pinĉeto da cinama pulvoro  
raspitaĵo da raspitaĵo da oranĝa ŝelo

Preparado: en ujo kunmiksi ĉiujn ingrediencojn, zorgante ke ne ekestu grumeloj. Laste, aldonu la gistaĵon. Buterumu kaj sukerumu tortujon, en kiun vi enverŝos la miksaĵon. Enfornigu je varma temperaturo (se gasa forno, je 180°) kaj ĝin kuiru dum ĉirkaŭ duona horo. Elprovu la kuiritecon, nepre nur

post 30 minutoj, per ligna stangeto: kiam ĝi eliĝos el la kuko sen ia ajn ĉokolada spuro, tiam elfornigu la torton kaj ĝin lasu malvarmiĝi. Nur tiam ĝin duonigu en du horizontalajn partojn, kaj poste ambaŭajn internajn surfacojn ŝmiru per kivia aŭ aprikota marmelado. Servu ĝin akompane de plia marmelado. Mmmh, bonan apetiton!

### **... kaj tutkolesterola dolĉa frandajo!**

#### **Densigita lakto**

##### Ingrediencoj:

375 ml da freŝa lakto  
500 g da sukero fajne muelita  
(aŭ da vanilsukero)  
45 g da butero  
kelkaj gutoj da vanilo

Preparado: Metu en poteton la lakton, sukeron kaj buteron. Kuiru, ĝis kiam la butero kaj sukero komplete dissolviĝos: tiam aldonu la vanilajn gutetojn. Daŭrigu la kuiradon je modera varmeco ekde la ekbulo (atentu, ke la lakto ne elpotiĝu!). Daŭre miksu, por ke la kremo ne agluigu al la pota fundo: la tuto devus daŭri ĉirkaŭ 15 minutojn - kontrolu atente la denseco-gradon mem, por ke ne kristaliĝu la miksaĵo. Kiam preta, verŝu en vitrajn vazetojn kaj atendu ĝis kiam la enhavaĵo estu malvarma, antaŭ ol fermi ilin per la kovriloj. Frandu ĝin kun kafo aŭ sur glaciaĵo aŭ meze de biskvitoj, aŭ simple ... je kulerplenoj, kaŝe de via edzo, kiu certe ame zorgas pri via dieto!

### **Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!**

Daŭras la testado pri konoj rilate Trieston. Espereble per la multaj demandoj ĝis nun prezentitaj, vi aprece eklernis ion pri la urbo, iamaj eminentuloj, lokaj kutimoj kaj moroj. Do, jen alia aro da demandoj por via plezuro kaj kleriĝo! Respondojn vi trovos je la 6.a paĝo.

- 1) Sankta Justo martiriĝis, plej supozeble, en 303.a jaro pK. Li vivis en la urbo Akvilejo [*Aquileia*] sub la imperiestroj Diokleciano (245-313) kaj Maksimiano. Kial li iĝis la patrono de Triesto?
- 2) La impona Preĝejo Serbo-ortodoksa estas konata ankaŭ per sia kromnomo: preĝejo de la Slavonoj [*chiesa degli Schiavoni*]. Kiom da personoj povas samtempe ĉeesti en ĝi? 1 600, 3 200 aŭ 6 400?
- 3) Juglandoj, aveloj, migdaloj, rosinoj, pinsemoj, rumo, ĉio envolvita en tre maldika foliigita pasto kaj ... jen la absolute tipe triesta dolĉaĵo: *Presnitz*. Ĉu vi konas ĝian originon kaj la signifon de ĝia nomo?
- 4) En la paroĥaj kunvenejoj por la triesta junularo oni praktikas sporton, ludas, studas informatikon, disvolvas diversajn didaktikajn kaj distriĝajn aktivecojn, sed ... oni ne preĝas. Kial?
- 5) Kial unu el la moleoj en Triesto ricevis la nomon "Aŭdaca" [*Audace*]?

### **NOVA REDAKTORO POR LA REVUO 'ESPERANTO' - N° 519 - Gazetaraj Komunikoj de UEA**

Unuafoje en pli ol cent jaroj, la revuo 'Esperanto' havos sian redaktejon ekster Eŭropo. La brazilano Fabrício Valle estas elektita de la UEA-Estraro por transpreni la redaktoran postenon de Stano Marček, ekde la jarkolekto 2014.

"Jam en sia skriba sinprezento, Fabrício Valle montris grandan energion kaj kreemon, kaj krome tre realisman ideon pri la redaktora laboro", komentas la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. "Tiun impreson plene konfirmis mia telefona intervjuo kun li. Ni estas entuziasmaj pri la ideoj kaj kapabloj, kiujn li alportos al nia komuna afero."

Valle estis unu el ses kandidatoj por la posteno de redaktoro (unu pli ol anoncite en pli frua komuniko). Movadano ekde 1970, li okupis diversajn postenojn en la brazila movado, interalie kiel prezidanto aŭ estrarano de Brazila Esperantista Junulara Organizo (1977-81), oficisto de Brazila Esperanto-Ligo (1996-2001) kaj prezidanto de la Federacia Konsilantaro de BEL (2001-04). Li ankaŭ fondis kaj gvidis propran eldon-entreprenon, 'Zamenhof Editores', de 1987 ĝis 1995. Lastatempe li okupiĝis pri provoj kreskigi la esperantistan ekonomion kadre de la organizo 'Intraespo'.

La redaktoraĵoj de Valle estas videblaj en la ok numeroj de 'Brazila Esperantisto', kiujn li redaktis en la jaroj 2001-02. Enkondukante novan aspekton kaj novan teamon de kunlaborantoj, li kreis revuon kiu elstaris grafike, stile kaj enhave. Ankaŭ por la revuo 'Esperanto' Valle antaŭvidas proksiman kunlaboron kun talentuloj sur diversaj kampoj, cele al revuo kiu "transformiĝos en aktivan engaĝilon, en instrugazeton por trejnado de volontuloj, en heroldon de la plej bonaj iniciatoj de la movadaj organizoj tra la mondo, en gvidilon por veteranaj kaj komencantaj E-gvidantoj, en inspiron por la esperantoj."

Gratulon al Fabrício Valle kaj bondezirojn de sukcesa kaj fruktodona laboro fare de la Triesta E-Asocio.

## Novembra Programo

<b>3.a, dimanĉo</b>	9h30 - renkontiĝo en la placo de Aurisina: vizito de la grotoj de Karl Ludwig Moser
<b>5.a, mardo</b>	18h00 - Kursoj de esperanto: unua baza leciono
<b>8.a, vendr.</b>	14h40 - Esperanto en alirprogramo Rai Uno - 2014: Bonaero atendas nin! 20h00 - Universitato de Esperanto - Kurso Astronomio kaj Astrofiziko - unua leciono de prof. Amri Wandel
<b>12.a, mardo</b>	18h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
<b>15.a, vendr.</b>	20h00 - Serĉado de terminoj laŭ specifa temo
<b>19.a, mardo</b>	18h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
<b>22.a, vendr.</b>	20h00 - <i>Abecé: un'escursione tra parole triestine, ricette, aneddoti</i> - Aboco: ekskurso tra triestaj vortoj, kuirreceptoj, anekdotoj, zorge de Edda VIDIZ
<b>26.a, mardo</b>	18h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
<b>29.a, vendr.</b>	20h00 - Fotoj pri Israelo de Elda (dua parto)

## Decembra Programo

<b>3.a, mardo</b>	18h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
<b>6.a, vendr.</b>	20h00 - Kurso pri Astronomio kaj Astrofiziko - Dua leciono de A.Wandel
<b>10.a, mardo</b>	18h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
<b>13.a, vendr.</b>	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: 9 minutoj kun ... 20h00 - preparlaboroj por la Zamenhofa Tago
<b>14.a, sabato</b>	horo 11h00 - Zamenhofa Festo: Rememorante nian Majstron. Prezento de la libro "La kapreolido Pirgo".
<b>17.a, mardo</b>	18h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
<b>20.a, vendr.</b>	20h00 - Kristknaska Festo
<b>27.a, vendr.</b>	20h00 - Adiaŭ, 2013 <sup>a</sup> jaro!

### SOLVO de cerbotiklilo de Viglo

Atente observu la sekvajn ciferojn kaj la nombron post la sageto, kaj diru, laŭ logika kriterio, kiu cifero devas anstataŭi la demandosignon.

65245812	→	3	82942689	→	3
79265436	→	4	37423567	→	2
		<b>12327545</b>	→	<b>?</b>	

La petita cifero estas **6**

Fakte, en ĉiu vico troviĝas nombro egala al la lasta, kaj la cifero post la sago indikas la envican pozicion de tiu nombro.

En la unua: **65245812**

**3**

Do, en la lasta: **12327545**

**6**



VIGLO

### Respondoj al demandoj pri Triesto (pĝ. 5.a):

- 1) Justo martiriĝis, ĉar li rifuzis malagnoski sian kristanecon. La torturado daŭris plurajn tagojn kaj fine li estis ĵetita en la triestan golfon, ligita kaj kun ĉekole ŝtonego, je la 2.a de novembro. La ŝnuroj, kiam li estis jam droninta, malligiĝis kaj lia korpo estis trovita sur strando, kie, kaŝe, li estis enterigita. Li famiĝis en urbe pro siaj agadoj favore al nenihavantoj. Li estas la kunpatrono de Triesto kune kun S.ka *Sèrvolo*. *Sèrvolo* suferis je martiriĝo la 24.an de majo 284, sub imperiestro Numeriano. Ununura filo de kristanaj gepatroj, ankoraŭ adoleska, iun tagon li decidis vivi solece en iu karsta groto, por dediĉi sin al preĝado kaj meditado. Pro siaj miraklaj faroj, li estis akuzita pri magia agado, sekve arestita kaj procesita. Morte kondamnita, li estis gorgotranĉita. Liaj relikvoj konserviĝas en la Katedralo Sankta Justo.
- 2) La preĝejo povas enteni ĝis 1 600 personoj. Konsekrita al Sankta Spiridiono la Miraklito [*Taumaturgo*], ĝi estis konstruita sur la fundamentoj de antaŭekzistanta ortodoksa preĝejo inter la 1861.a kaj 1868.a jaroj.
- 3) Komence de 1800, Sissi, imperiestrino de Aŭstrio kaj Hungario, vizitis Trieston. Iu urbocentra kukvendejo kreis dolĉaĵon ŝiahonore, kun la jena surskribo: "Se Vi rondiras la mondon, revenu ĉi tien!" La kukisto ĝin nomis "Preis Prinzessin" (Premio Princino), sed triestanoj tuj titolis ĝin "Presnitz".
- 4) Ĉar tiuj triestaj kunvenejoj, unikaĵo en tuta Italio, naskiĝis pro komunuma iniciato en 1908 kaj ĝis hodiaŭ ili restis laikaj.
- 5) La 3.an de novembro 1918, fine de la 1.a mondmilito, la unua ŝipo de la Italia Mararmeo enirinta la triestan havenon kaj albordiĝinta ĉe la moleo Sankta Karlo, nomiĝis Aŭdaca.

**Plej Serenan Kristnaskon kaj Pacan 2014<sup>an</sup> Jaron al la TEA-anoj kaj Gelegantoj deziras Triesta E-Asocio!**



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

**Redaktanto:** Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

**Sidejo:** Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 18-20; vendrede 19-21

**Tel:** (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

**Reto:** esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

**Grupaj ttt-ejoj:** www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

**Poŝta adreso:** Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio

**Poŝtĉekkonto** N° 10834349